**UKRAINIO. GRAVE!!!**

**NI BEZONAS VIAN SUBTENON**

Ĉiutage venas al nia regiono kelkdek ukrainaj familioj kun infanoj. Ni ne volas resendi iun ajn. La skalo de la bezonoj kaj de la agadoj estas grandega.

Ekde la tago, en kiu eksplodis la milito, ni kondkukas en Złotoryja (Malsupra Silezio) subtenejon por la alvenantaj rifuĝintoj kaj kolektas materialajn kaj financajn donacojn por ili.

Ni subtenas la venantajn familiojn, helpante al ili trovi tranoktejojn, gastigejojn kaj memstarajn loĝejojn. Ni jam disdonis multegajn vestojn, manĝaĵojn, korpopurigaĵojn, meblojn, matracojn ktp.

La Eŭropa Centro de Interkultura Edukado aliĝis al la helpokampanjo gvidata de la Societo Nasze Rio kaj Societo Hortus en kunlaboro kun la Urba Centro de Socia Helpo kaj kun la paroĥo de s-ta Jadviga. Konstante aliĝas aliaj organizaĵoj kaj institucioj: Asocio de Pola Skoltaro Złotoryja, Fondaĵo Animus, Volontula Fajrobrigado, vilaĝaj municipoj de la Złotoryja-distrikto, lernejoj, antaŭlernejoj, grandaj kaj malgrandaj firmaoj kaj oficejoj.

Ĉar ĉiam pli novaj familioj alvenas sen ajna havaĵo kaj estas direktataj al ofte tute malplenaj aŭ nekomplete ekipitaj loĝejoj, ni URĜE bezonas praktike ĉion.

Ni donas helpon ne nur ene de la urbo, sed ankaŭ de la tuta distrikto, priservante la venintojn dislokatajn en diversaj lokoj de nia regiono.

Estas kreita loka HELPOFONDUSO. Ĉiuj arigitaj monrimedoj estas destinataj nur por helpo al rifuĝintoj el Ukrainio, ekskluzive por aĉeti nemalhaveblajn aĵojn, medikamentojn ktp.

Numero de la konto por pagoj:
Santander Bank (Stowarzyszenie Nasze Rio)
39 1090 2095 0000 0001 4274 0265

Datumoj por eksterlandaj ĝiraĵoj:
currency: PLN IBAN: PL39109020950000000142740265
SWIFT-kodo de la banko: WBKPPLPP, bank: Santander Bank Polska S.A. al. Jana Pawła II 17, 00-854 Warszawa, country: Poland

Pagante, ni alskribu la vorton "Esperanto", por ke estu sciate, kiel granda estas la verda koro.

Senĉese estas ĝisdatigataj informoj koncernantaj niajn agadojn:
https://www.facebook.com/groups/149314787378009

Ni aliĝu al la kampanjo „NI KUNE POVAS PLI MULTE"!

Małgosia Komarnicka
Prezidanto de la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado
Elżbieta Karbowska
Sekretario de la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado